9-a JARO, N-o 403



LEIPZIG, 25./3. 1933

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS MONATE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO k ADMINISTREJO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. | APERAS MONATE

EPILOGE

Lastatempe mi ricevis relative multajn leterojn de K-doj, kiuj diras sian bedaŭron k eĉ ĉagrenon pro mia decido forlasi la gvidadon de SAT. Kelkiuj insistas, por ke mi ne persistu en mia decido. Nature tiuj simpatiesprimoj ne lasas min indiferenta k mi dankas pro ili; sed nenio povus kontraŭpezi mian deziron tute liberiĝi el respondeca posteno.

Jam de kelkaj jaroj mi sentas min kvazaŭ katenita per la penso, ke senĝena, tute senrezerva esprimo de miaj ideoj povus eble malutili al nia organizo. Kvankam mi neniam celis, nek eĉ deziris, ke mia persona kompreno pri diversaj soci-politikaj aferoj fariĝu la oficiala vidpunkto en SAT, tamen la sperto montris, ke ekzistas la emo ĉe multaj personoj konsideri miajn dirojn kiel ion oficialan. Tia stato estas bedaŭrinda, sed praktike neŝanĝebla aliel ol per demeto de ĉia respondeco en la gvidado de nia Asocio.

Oni do ne kredu, ke mia decido rezultas de ia subita kaprico; fakto estas, ke jam delonge mi intencis forlasi la gvidpostenon. Sed kompreneble tion mi ne farus, kiam ardis la batalo, kiu devis decidi, ĉu SAT restos aŭ ne la organizo, kia ĝi estas ekde sia fondiĝo. Ili grave eraris, tiuj blufuloj, kiuj opiniis, ke sufiĉos superŝutadi min per kritikoj, riproĉoj k eĉ insultoj, por ke mi lasu ilin libere fari el nia sendependa Asocio filion de politika partio.

Inter tiuj skismigintoj, kelkaj sendube estis sinceraj. Mi memoras, kun kia entuziasmo ili kriis sian kredon pri proksima forfalo de la kapitalismo, pri la certo, ke ilia partio baldaŭ kaptos en la manojn la regpotencon. En iliaj okuloj sufiĉis dubeti pri tio, por esti rigardata kiel kontraŭrevoluciulo, kiel socialfaŝisto. Ho ve! jam du – tri jaroj forpasis k kion ni vidas? En la sola lando, kie la kompartio konsistigis amasmovadon, la alsaltotaĉmentoj de Hitler povas preskaŭ sen ia kontraŭstaro okupi urb- k sindikatdomojn. Flago kun svastika insigno (hoko-kruco) flirtas sur la Libknehita Domo en Berlino. ... Kaj ĉe la horizonto nenia ruĝarmeo vidiĝas, venanta por defendi la komunistojn. Plorindaj konstatoj! Kaj kiom mi dezirus male konfesi, ke mia skeptiko estis senbaza! Estas ja dolore pravi en tiaj cirkonstancoj... Kiu do ne vidas klare hodiaŭ, ke la laboristaj esperantistoj pli ol iuj aliaj havas intereson ne utiligi nian lingvon por agiteca propagando, se ili volas trafe servi la esperantan aferon?

Ĉiam mi batalis, por ke nia peresperanta entrepreno ne havu politikan programon, ne difinu al si politikajn taskojn, sed povu tamen per sia *informk eduklaboro* esti utila al *ĉiuj* laboristaj organizoj; mi ja konsiderus kiel ian perfidon, se SAT konsentus servi nur al unu partio – kia ajn ĝi estas. Nia movado retrovis sian spiritan ekvilibron; ĝi havas antaŭ si rektan vojon k ne ekzistas nun granda danĝero, ke ĝi deflankiĝu, sekve de malhonestaj aŭ fanatikulaj artifikoj.

Movado devas ekzisti sen kuratoroj k vole nevole ĝis nun la fondintoj de SAT ludis tian rolon. Ĝi eble estis necesa en la komenca tempo, sed mi opinias, ke nun ĝia pluigo povus eĉ esti malbona. Estas necese, ke aliaj manoj ekprenu la direktilon. Tial mia nekontraŭstarebla deziro demeti ĉiun oficialan rolon, ne povas domaĝi al nia komuna entrepreno.

Kompreneble la fakto, ke mi ne plu tenos la direktilon, neniel signifas miaflanke seninteresiĝon pri la gvidado. Mi ja restas SAT-ano k estas la devo de ĉiu interesiĝi pri la vivo k stato de sia organizo.

Nun, sentante min preskaŭ liberigita de respondeco, mi emas ĵeti ekrigardon malantaŭen por ĉerpi instruojn el la faritaj spertoj. Proze mi intencas kanti mian *cignan kanton*, se la legantoj permesos, t. e. se ilin ne tedos tiu mia projekto. Ĉar por plenumi tiun taskon restas ankoraŭ kelkaj monatoj, mi do povos ere liveri miajn pensojn k en tioma kvanto, en tia formo, ke al neniu ili donos kapdoloron. Verŝajne mi ankoraŭ herezumos, eble eĉ pli ol kutime, tial ke mi jam sentas pli libera mian plumon. Ĉiu do bonvolu ne forgesi, ke mia nura celo estas instigi la leganton al memstara pensado. Nenial mi deziras, ke miaj ideoj estu sen kritiko akceptataj; male oni rilatu al ili kritike, antaŭ ol ilin akcepti aŭ rifuzi.

Kompreneble du plus du estas kvar. La plej profunda cerbumado pri tio ne povas alkonduki al alia konkludo. Sed tia konstato neniel signifas, ke veroj devas esti *krede* akceptataj. Per kredeca akcepto ili perdas sian efikon; ili fariĝas kvazaŭ senkarnaj mumioj, kiujn diversspecaj religiuloj respektas, adoras en luksaj, senutilaj maŭzoleoj...

Sufiĉa prologo, ĉu ne? al mia epiloga babilado. Ĝis la!...

E. L.

K-doj ekstergermaniaj

Ne faru neniajn monpagojn nek mendojn, aliĝojn kc. al Lajpcig (Leipzig). Ĉion direktu al Parizo (23, rue Boyer, Paris XX). Pagu plue al la poŝtĉekaj kontoj, tie, kie ili estas instalitaj!

LA KOOPERATIVA MOVADO EN STOKHOLMO

Parolante pri Stokholmo oni ne povas eviti iomete tuŝi la kooperativan movadon, kiu ankaŭ forte enradikiĝis. La konsum-kooperativa movado de Stokholmo estas eĉ modelo por multaj lokoj en- k eksterlande. Ĝi fariĝis tiel forta, ke ĝi nuntempe diktas la „tagprezojn" de la vendaĵoj, k ĝiaj butikoj estas tiel bone instalitaj, ke ili estas imitataj de plej grandaj burĝaj negocejoj samspecaj. Kun siaj pli ol 300 butikoj la Stokholma konsum-kooperativa movado bone povas helpi al la mastrumado de la Stokholmanoj, kiuj ĉiam pli k pli aniĝas. La anaro nun estas pli ol 70 000 k la negocado bilancas por la jaro 1932 je ĉirkaŭe 52 milionoj da kronoj.

Sed la Stokholma kooperativa movado estas nur parto de la sveda. La centro de la kooperativoj estas ankaŭ en Stokholmo k ĉi tiu sukcesis frakasi tri monopolojn enlandajn. Unue la margarina trusto — parte ankaŭ internacia — ne volis liveri margarinon al konsumkooperativaj negocejoj. La centro do konstruis novan modernan fabrikon k mem fabrikis la margarinon. Per diversaj provoj la privatkapitalismo tiam provis malhelpi la fabrikadon, sed malsukcesis. Oni ne atentis pri la solidaro de la kooperativanoj k ĉiuj provoj restis senefikaj. La trusto mem disfalis, sed la kooperativa centro diktas nun la prezojn de tiu varo. La faruna trusto estis alia, kiu ĉiam, por havigi grandan profiton al siaj akciuloj starigis tro altajn prezojn por la faruno. Malgraŭ avertoj la trusto daŭrigis. La kooperativa centro tiam decidis konstrui novan muelejon. Nun la trusto vekiĝis, k ĉar jam estis sufiĉe da muelejoj por la bezono de Svedio, la trusto devis intertrakti kun la kooperativa centro pri vendo de unu el ĝiaj muelejoj. La trusto frakasiĝis k la prezo de faruno poste ne estis tro alta. Ĉar la prezo por galoŝoj (en Svedio tre uzata artiklo) estis tro alta kompare kun la produktoprezo, la kooperativa centro faris ĝentilan admonon al tiu trusto• malkarigi ties prezojn. La respondo estis malĝentile nea. La Kooperativa Estraro konstruis modernan fabrikon en suda parto de la lando k la trusto nun devis submetiĝi. La nura decido pri konstruado de kaŭĉuka fabriko estis sufiĉa por malkarigo de la galoŝprezo po 1 kr. por paro. Poste la prezo fariĝis ankoraŭ pli malalta, sed la trusto senfortiĝis. Ĝi nun devas submetiĝi al la prezoj de la kooperativa fabriko.

La elektraj lampoj dum longa tempo estis tre multekostaj en Svedio. Oni devis pagi por simpla elektra lampo 1,35 kronojn. Rilate al la produktokostoj tiu prezo estis tro alta. Tiun fakton la kooperativa Estraro sciigis al la mondkonzerno. Ĝi negative respondis. Nu, la kooperativa Estraro konstruis modernan fabrikon, k same nun kiel pli frue la trusto fine komprenis, ke ĝia potenco estas minacata. La trusto malaltigis la prezon de la lampoj unue ĝis 1.15, poste plie reduktis ĝin ĝis 0.90 kr. k fine ĝis 0.75 kr. Tamen la novaj kooperativaj lampoj estis pretaj k montriĝis, ke ili eĉ estas pli bonaj ol tiuj de la konzerno. La kooperativa Estraro jam antaŭ la komenco de la konstruado de la fabriko promesis, ke oni vendos lampojn por 0.85 kr., kiu ankoraŭ nun estas la prezo. La kooperativo nun fabrikas 25 000 lampojn ĉiutage k la potenco de la trusto en Svedio estas nuligata. Sed, ĉar temas pri artiklo kun internacia signifo, la Estraro provis havi kunlaboron kun la aliaj landoj el Skandinavio. Ĉe kunveno de reprezentantoj de la koncernaj landoj oni decidis fondi „Lumaförbundet" (la luma asocio) — *Luma* estas la nomo de la lampo —, en kiu sekve partoprenas la sveda, norvega, dana k finlanda kooperativaj Centroj. La lampoj trovis bonan merkaton en Norvegio k Finlando. Verŝajne ankaŭ la potenca angla kooperativo aliĝos. Ĉar tiu ĉi asocio estas la unua provo internacie krei produktorganizon kooperativan, ĝi havas specialan intereson k mi esperas iam povi en „S-ulo" rakonti pli detale pri ĝi. Ĉiuokaze la kongresanoj de la XIII-a havos okazon pli bone konatiĝi kun tiu nova branĉo de l'kooperativa movado, ĉar vizito al la fabriko enestos en la kongresa programo.



La Luma-fabriko

La vitra turo dekstre servas al du taskoj: 1. provoj de lampoj. 2. reklamo per la lumo, kiun alsendas la kelkcent lampoj el diversspecaj grandoj.

Stokholmo estas centro de la kooperativa movado, sed ankaŭ la laborista movado metis sian centro de la kooperativa movado, sed k ilia federacio havas siajn sidejojn en Stokholmo. Tuta strato k placo estas dediĉita al la laborista movado, kie la sindikatoj mem posedas domojn. Plej malnova estas Domo de l' popolo, kiu devis du fojojn aĉeti po unu domo por povi kontentigi la bezonon de ejoj por la organizoj. Apud la du domoj de l'popolo estas du aliaj, ambaŭ apartenantaj al la Federacio landa de la sindikatoj k apud tiu estas domo, kiun posedas la tipografistoj. Krome la lokomotivistoj havas unu domon ĉe la sama strato. En unu el la domoj de la sindikata federacio S L E A nun havas sian sidejon.

La placo Nora bantorjet (Norra bantorget), norda relvoja placo, estas intime ligita kun la laborista movado. El tiu loko ĉiujare la Stokholmaj laboristoj faras sian manifestacion dum Unua de majo, marŝante tra la urbo de Nora Bantorjet al loko sur la limo de la urbo. En tiu placo ankaŭ la partoprenontoj de la dektria kolektiĝos por manifestacio la 6-an de aŭgusto.

Kiam la okhora labortago estis leĝa fakto, la studlaboro de la laboristaro estiĝis tre intensa k per la helpo de ABF*, kies nuna centro estas en Stokholmo, multaj plifaciligoj estis atingataj por la studemuloj. La studrondoj ĉiam de tiu tempo plimultiĝis k jam estas menciite, kian grandan rolon esperanto ludas en la kadro de ABF. En la Stokholma sekcio de ABF oni starigis studhejmon, kie multaj el

* Lab. Kleriga Asocio.

la kongresanoj trovos komfortan loĝejon dum sia restado en Stokholmo. En la vintro ĝi aspektas aliel. Kolektiĝas tiam en la vesperoj la junaj gelaboristoj por studo. Atenta rigardanto trovos en la vizaĝoj de tiuj gejunuloj sopiron al evoluo de la inteligento, sopiron al scio pri la diversaj aferoj, kiuj konsistigas nian vivon.

La sindikata, politika, kleriga k kooperativa movadoj kreis laboristaron, kiu estas celkonscia k kiu volas fortigi k plue evoluigi tiujn movadojn en la servo de plibonigo de la tuta popolo. Tial la Stokholma laboristaro, ankaŭ konsciante pri la gravo de esperanto, pli k pli lernas tiun lingvon. *Joĉjo.*

Bonmemoro pri Stokholmo.

En la jaro 1930 mi estis unuafoje tie en Stockholmo, en la insulurbo aŭ, gajnas la nomon, „Norda Venecio", kiel oni ofte diras, en la urbo, kiu kun sia bela venecia urbdomo k granda rivertrafiko. Mi ne ankoraŭ estis esperantisto, tamen mi jam konis kelkajn esperantajn vortojn. Ĉar mi estis tie sola k ĉar mi ŝatis en eksterlando komunikiĝi kun la loĝantoj, mi ofte provis trovi samideanon.

Sed longe mi klopodis sensukcese, ĝis la somer-sunturniĝo, la 12-a de junio, kiam oni festis surstrate en tuta Skandinavio. Estis bela vetero k la popolo, plej multe la junularo dancis surstrate super granda majarbo belajn malmodernajn popoldancojn. Tiel ankaŭ en Stokholmo, k mi partoprenis tie, ĝis apud mi subite staris fremda junulo, kiu portis verdan stelon. Mi ekkuraĝis diri „Bonan tagon". La afabla esperantisto respondis k rekte invitis min partopreni promenadon. Post kelkaj vortoj li jam sentis, ke mi estis nek esp-isto nek svedo. Bedaŭrinde, mi ne sufiĉe ankoraŭ parolis esperanton, sed feliĉe li parolis germane. Mi germano, li estlandano ni nun uzis germanan lingvon. Malgraŭ tio li petis min partopreni je esperanta kunveno de LEA en Stokholmo. Tie, ambaŭ tute ne sciante svedan lingvon, ni estis devigataj uzi esperanton, ĉar en la klubo de LEA ne estas permesate uzi nacian lingvon.

Mi eklernis nun rapide, precipe ĉar min interesis la vivo k la aranĝoj de l'LEA-kunvenoj. Ĉar la vivo de la espistoj en Stokholmo estas modela por la tuta esp-istaro, mi priskribu ĝin koncize.

Preskaŭ ĉiam estis en la grupo eksterlandanoj, ofte ni estis tie el kvin aŭ pli da aliaj landoj, unufoje eĉ estis reprezentantoj el pli ol dek nacioj. Oni tute ne sentis tion, ĉar ĉiuj uzis nur esp-on. Oni nur konstatis tion, kiam oni sin prezentis unu la alian. Ĉiu fremdulo devis paroli, multe aŭ malmulte, ankaŭ egale pri kio. Tiel oni aŭdis novaĵojn el tutmondo, tiel oni sentis la sennaciecan, proletecan karakteron en esperanto k oni jam povis anticipi la unuecon de l'tutmonda proletaro.

Paroladoj pri la movado, el la vivo de l' proletaro alternis kun temoj pri vojaĝoj k. a. Ne nur tiel oni aranĝis la kunvenojn; oni ankaŭ ne forgesis la bonkoran parton de l'vivo. En ĉiu vespero oni aranĝis amuzan kafosocieton, ĉe kiu oni ŝercis k eldemandis la fremdulojn. Post trinkado oni kantas (laŭ la SAT-kantaro) k babilas senĝene. Tiel oni progresas bone en la uzo de esp-o k kun la intereso de la LEA-anoj kreskis ankaŭ la esp.-influo mem.

Tiel mi lernis esp-on k krome konatiĝis kun multaj socialistoj, k oni sentis, kiel eblas praktiki laŭ Karlo Marks la proletaran unuiĝon tutmondan. Esperante, ke mi povas reveni al Stokholmo, mi forlasis la landon, k jam en 1932 mi povis reviziti la LEA- k SAT-anojn de Stokholmo. Denove mi konstatis la modelan vivon de l' esp-istaro, dum vojaĝado vizitante multajn esp. grupojn. Certe mi esperas partopreni la Kongreson en Stokholmo, kiun la K-doj tieaj sendube bone aranĝos. Konsciante pri tio k pri la modela laboremo de l'Stokholma Lab. Esp. Grupo, mi alvokas nur: ni lernu el la svedaj K-doj, ni imitu ilin! *Ŝnejder (18 057).*

Resuma jarraporto
de Federacio de Lab. Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo (por 1932).

Gravaj problemoj prezentas sin en la laborista esp-ista movado, kiuj ankaŭ en la nederlanda regiono devis esti solvataj. La pligrandiĝanta organizo postulas daŭre pli da atento pri multaj demandoj. La Federacio faris gravan paŝon antaŭen per starigo de provincaj distriktoj k de federacia konsilantaro, per kiu la estraro estas pliampleksigita k havas daŭran kontakton kun ĉiuj lokoj de l' regiono. Tiu aranĝo okazis laŭ kongresdecido, ĝia unua kunveno komence de l' jaro 1933; la ekiro mem jam montris, ke ni povas atendi gravajn rezultojn estonte.

La membronombro en 1932 denove plialtiĝis per 404 anoj. Je la jarfino ni nombris precize 1965 anojn. Dum la jaro ni atingis pli ol 2000, sed en la jarfino pro la krizo bedaŭrinde multaj eksiĝis. La nombro de simpatiantaj membroj malplialtiĝis per ĉ. 150. Al la organizo aliĝis sume 31 simpatiantaj organizoj (sindikatoj), inter kiuj la Ligo de la nederlandaj sindikatoj (N.V.V.). Feliĉe ni post novjaro enskribis jam novaliĝintojn, tiom, ke la membraro denove estas pli ol 2000. La Federacio nombris jarfine 62 sekciojn kun 1803 anoj. La nombro da anoj en sekcioj pligrandiĝis per ĉ. 550. Ĉar ili formas la kernon, ni povas konstati sanan kreskon. Konsidere la malhelpojn pro la krizo, trafinta la laboristaron, rerigardo al 1932 estas instigo daŭrigi nian laboron, por „esp-o en la servo de l' tutmonda proletaro".

La starigita „Libro-Servo" federacia plene servis al la movado; per ĝi ni sukcesis ne nur veki pli da intereso pri la literaturo, sed ankaŭ ebligi viglan aĉetadon, per aranĝo de facila pagmaniero. Ni eldonis la broŝuron de K-do Lanti „Lab. Esperantismo", tradukitan nederlanden de K-doj Faulhaber k de Bruin; „Nia Lernolibro", verkita de K-do Lem, el kiu 3000 ekz-oj vendiĝis dum nur kelkaj semajnoj; skriban esp. kurson de l'sama K-do; ĝi estis disaŭdigata de V.A.R.A. (Asocio de lab. radio-amatoroj) en kunlaboro kun la Lab. Kleriga Instituto. En kunlaboro kun la aliaj samlandaj organizoj aperis broŝuro „Esp-o en la Lernejo". Plie: fenestro-afiŝo kurspropaganda; „La Konsilanto", helpa lernolibro pri gramatiko de K-do Degenkamp; skriba kurso de K-do Faulhaber speciale por kursgvidantoj k pliperfektiĝemuloj; serio da flugfolietoj.

La organo „Lab. Esperantisto", aperis regule dusemajne en kvanto de 3000 (kelkfoje pli). Aperis 23 n-roj kun sume 166 paĝoj. Speciala majnumero kun salutoj de K-doj el preskaŭ la tuta mondo, poresp-aj artikoloj de famuloj, ktp, estis altvalora propagandaĵo. Nia organo estas nun legata en minimume 2500 familioj. Regule ni prizorgas 5 bibliotekojn, el po 30 libroj. Nova estas en preparo. Ekspozicia materialo estas daŭre prizorgita k renovigita por servo al la sekcioj. Sume ni aranĝis ĉ. 40 ekspoziciojn. — Laŭ la jam konigitaj nombroj ni povas konstati, ke la nombro da kursanoj superas 3000.

La estraro klopodis atingi kunlaboron en la jam funkcianta Ekzamena Komitato de la neŭtrala organizo L.E.E.N. k la katolika N.K. Pro la sinteno de l' komitato ni ne sukcesis en tio. La estraro de L.E.E.N., tamen plue klopodas sukcesigi kunlaboron sur la bazo de ni dezirata. Ne sukcesinte ni tiurilate decidis mem starigi ekzamenan komitaton, kiu jam ekfunkciis.

La kunlaboro kun SAT laŭ la konata konvencio estis plene plenumata. Regule aperadas en nia organo la


Germanaj K-doj petas, ke oni ne skribu al ili . . . sensencaĵojn.

komunikoj de l'SAT-peranto. En div.-sekcioj regule funkcias SAT-peranto, kiu havas rektan kontakton kun la regiona peranto. La Federacio estis reprezentita en la 12-a SAT-kongreso de K-do Veen (sekretario); ĝi tenis daŭran kontakton pere de la regiona SAT-peranto k rekte kun la SAT-direkcio. La Fed. subtenas la regionan SAT-peranton per ĉiujara sumo de 25 gd.; ĝi garantiis por la necesa nombro da antaŭmendoj je la SAT-eldonajo „Fremdvortoj" (Neergaard). Same ĝi rilatis kun SAT pri eldono de verko de K-do de Bruin (Enschede) pri Historio de l'esp. movado.

La ideologian bazon de SAT la fed. akceptas kiel plej ĝustan en la nova formo, kiun donas la lab. esp. movado al ni: Oficialigo de esp-o ne signifu malaperon de l' internacia organizo pro malapero de l' naciaj organizoj. Ĝi decidis prezenti al sia proksima kongreso proponon favoran al la propono de SAT, liveri „S-ulo"n al membroj de la Federacio.

La nederlanda lingvoregiono estis intense prilaborita en la pasinta jaro k ne sensukcese, kiel vi vidas el supraj nombroj. Minacoj ĉiuflankaj kontraŭ la proletaro trudas al ni kunigon de la fortoj. Bone pripensante tion ni plenkonscie daŭrigu nian laboron, por ke realiĝu la promeso, kiun nia movado prezentas al la proletaro!

La Sekretario de F.L.E.

La Norvegia L.E.A.

nomiĝas nun oficiale N.A.L.E. (Norvega asocio lab.-esperantista). Organo: „Arbeider-Esperantisten". Estrar-kunveno de 13. febr. en Oslo akceptis kiel SAT-reprezentanton de l' lab. esp. movado en Norvegio K-don *Th. Smadahl* (16 788), sekr. de N.A.L.E. (adr.: Boks 407, *Oslo).* Al tiu K-do oni turnu sin pri informoj, gazetservo ktp. Kiel *peranto* (por aliĝoj) funkcias plue K-do *M. Muribo.*

Socialista Esperanto-Societo en Pollando

estis fondata en Varsovio (Warszawa). Poŝta adreso: *Warszawa,* Marszalkowska 81, advokato *J. Litauer* (Tel. — 9.44—74 de 17.30 ĝis 19-a horo).

La Societo jam komencis sian agadon per aranĝo de kursoj, lekcioj kc. La fondintoj de l' Societo estas Litauer, Bugajski, Hartman k Markowski, kiuj forlasis la Laboristan Esp. Asocion „Laboro".

Jus aperis: **G. P. de Bruin**

Gvidilo tra la esp. movado

Necesa al ĉiuj esp-istoj, por koni nian movadon!

50 pĝ. — Prezo: 0.70 mk.g.

SAT, 23, rue Boyer, Paris 20

Por Nederl.: J.W. Minke, Veeteeltstr. 144, Amstd.

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

En la n-ro 401 ni jam priparolis la staton de la lab. esperantista gazetaro ĝenerale. Ni ne menciis tamen ĉiujn gazetojn el tiu kategorio. Intertempe ni ricevis freŝdatan kajeron de la „ISK"-revuo (n-ro 17, jan./marto). K-dino *Hodan,* esplorante la problemon pri demokratio k diktaturo, bazas siajn konsiderojn sur la fiasko de l' demokratio en Germanio. ISK; kiu malakceptas tiel same la demokration el la nuntempa speco kiel la nuntempan diktaturon, kiu degeneris en despotismon, rekomendas eduki kapablajn proletajn gvidantojn, kion laŭ la aŭtoro la marksistoj ne faras. Artikolo pri la terposedo en Argentinio ankaŭ estas interese verkita. Rilate la lingvon, la redaktantoj atentu pri korekta uzo de „sia, lia".

„Arbeider-Esperantisten" (Oslo, Norvegio) reaperis, post 3-jara interrompo, presite (jan.), tute en norvega lingvo, kun varbartikolo por SAT. Ni gratulas pro tiu reviviĝo!

Inter la „neutrala" gazetaro „Heroldo de Esperanto" daŭre aperas ĉiusemajne, ankaŭ kun diversaj aldonoj: por junuloj, turistoj, pri lingvaj demandoj, ktp. La ĉefaj problemoj, hodiaŭ okupantaj la paĝojn de tiu gazeto, estas la „novorganizo de la movado" (vd. la artikoleton pri skismo en la neŭtrala movado, en n-ro 402) k la Kolonja universala kongreso en ĉi tiu somero. Iuj legantoj protestis pro tio, ke la disputado pri la organizformo plenigas ofte tutajn n-rojn. La „neŭtrala" gvidprincipo devas konduki kompreneble ankaŭ al adaptiĝo al la novaj cirkonstancoj kreataj per la faŝismo. Tiel *Teo Jung* jam en la n-ro de 26. 2. (713), por komplezi al esp-istaj ŝovinistoj, proponas neŭtraleme: „... Se ekzistas individuoj, kiuj rifuzas, per aliĝo al neŭtrala landa societo aŭtomate fariĝi membro de la same neŭtrala internacia UEA (k tiaj efektive ekzistas), *oni fondu por ili* (aŭ ili mem fondu) *specialan naciistan esp-societon.*(!) (La substreko estas de T. J. mem). El taktika vidpunkto tio ne estus malutila, sed eventuale eĉ utila, precipe en landoj, kie regas la naciistoj (ekz. Germanujo, Italujo)." —

La sinteno de la oficiala organo de UEA, „Esperanto", estas tiu de atakito, kiu defendas sian *principan* pozicion, k tiel memorigas nin pri la batalo, kiun kondukis nia organo depost 1929 kontraŭ statutrompuloj k skismigantoj. La UEA-estraro defendas tute logike la principojn de l'universalo k de l'praktika uzado: „Enlande oni povas propagandi, instrui k primediti la lingvon, uzvaloron k sencon ĝi ĉefe nur havas, kiam korpe aŭ spirite oni transpasas la landlimon" (Stettler en la febr. n-ro). —

„Literatura Mondo", literatura k arta revuo, kiu cetere malgraŭ sia tutmondeco ne havas pli ol 600 abonantojn(!), estis devigata rezigni pri la trouzo de neologismoj, troveblaj en neniaj vortaroj, pro la protesto de l' legantaro; same pri nudbildoj k iuj „futurismoj". Efektive „L. M." estis grave malsana je neologismito*, k la sana reago de l' legantaro estas salutinda.

„Ligilo" estas plaĉe prezentata organo de l' ĉeĥoslovakaj neŭtralaj esperantistoj. Ĝi aperas nur depost 3 jaroj, de kiam la malnova tiulanda gazeto „Progreso" ne plu donis vivsignon k la tieaj esp-istoj malpaciencîĝis por havi organon. Ĝi estas tute esperanta k havas ankaŭ literaturan parton. Nur la prilingvaj notoj estas mankohave prilaboritaj. Cetere esperantlingva gazeto por nacia societo ŝajnas al ni ne celkonforma k povas nur malutili al la organoj, kiuj celas tutmondecon. *N. B.*

* — *ito,* sufikso por formi la nomon de organa malsano. (Vd. Pl. Vortaro, p XIII.)

Deziresprimo.

Al la Plenum-Komitato,

Parizo.

Ni subskribitaj SAT-anoj deziras, ke la nederlanda LEA akceptu la proponon de la Ŝtutgarta SAT-rondo, ke Amsterdamo estu la sidejo de la estonta Plenum-Komitato k Direkcio de SAT. Proletajn salutojn

Karl Gehmayer, 17 177; Rosa Brumer, 11 700 (Attnang, Aŭstrio).

Sendu salutojn!

100 000 ekz-ojn de 16-paĝa „Lab. Esperantisto" eldonos okaze de 1. majo la nederlanda LEA kiel specialan propag. n-ron. Sed ni sukcesos nur, se el ĉiuj landoj ni ricevos salutojn aŭ tre koncizajn raportetojn. Bonv. relegi, kion ni skribis en „S-ulo" n-ro 402, p. 72. Ĉiuj sendintoj (antaŭ 15/20. aprilo) ricevos rekompence ekz-on de la maja gazeto. Adresu al red. de „Laborista Esperantisto", Middenweg 226, *Amsterdam-O,* Nederlando.

SENNACIECA REVUO

Aperis la unua 16-paĝa kajero

kun interalie tre interesa k primeditinda artikolo de R. Luksemburg pri la nacia demando, priskriboj el Svedio, Finlando, Nederlanda Hindio, Maroko, Britio, ktp. ktp. Riĉa *literatura* parto. — *Lingvoscienco,* k. c.

Unuopa n-ro: 0.40 mk. g.

Abontarifon petu ĉe la Administracio. de SAT, 23, rue Boyer, Paris-20.

Fervojisto propagandas esperanton

Mi estas fervojisto, pli precize lokomotiva hejtisto unuaklasa, tio signifas, ke laŭ mia kategorio mi rajtas deĵori k deĵoras preskaŭ ĉiam kiel lokomotiv-kondukisto. Ĉiuj fervojistoj en Hispanio libertempe povas senpage uzi la fervojan linion, ĉe kiu ili deĵoras, k ili pagas nur la kvaronon de l' ordinara prezo, se ili vojaĝas sur linioj de aliaj kompanioj. Per tiaj avantaĝoj la esperantistaj fervojistoj havas bonegan eblon propagandi nian lingvon. Se estus multaj konsciaj fervojist-esperantistoj, oni multe pli disvastigus esperanton: ĉar pro la senpaga veturado ni fervojistoj povas semi nian esperantan semon en multaj lokoj.

Per la SAT-Jarlibro mi eksciis, ke en kampara vilaĝo *San Esteban de Bas* (46 kilometrojn for de mia loĝurbo *Gerono*) estas SAT-ano, kiun mi ankoraŭ ne konis. Mi skribis al li, k anstataŭ respondi li venis iun tagon persone, sed mi bedaŭrinde ne estis hejme. Post nelonge mi reskribis, proponante viziti lin miaflanke, k li kamaradece akceptis mian proponon.

Estas lundo, en kiu mi ferias; frumatene la frosto estas tre akra. Mi atingas la fervojan stacion k envagoniĝas en trajno de mallarĝa relvojo. Tiu fervoja entrepreno havas nur 56-kilometran longon. Dank' al mia atestpapero mi pagas nur kvaronan bileton. La lokomotiveto jam fajfas; la vagonaro ekmoviĝas. Mi komencas legi *Sennaciulo*-n.

Je la $8^{1}/_{2}$-a horo mi atingas la celon de mia vojaĝo k ekvidas sur la stacia perono inter atendantoj junulon kun esperanta stelo, kiu post saluto esperantlingva kunirigas min. Estas la celito. Ni iris al lia hejmo en vilaĝo, k dume li rakontis al mi, ke li estas masonisto, kiu laboris en Parizo k tie eklernis esperanton. Sed pro troa senlaboreco li estis devigata reveni hejmen k laboras nun kiel kamparano: lia pli aĝa frato estas la bienmastro; estas tie du junuloj kiel dungitoj por la kampara laboro.

Li prezentas al mi siajn familianojn, k lia patrino regalas min per glaso da pura bovina lakto. Inviton por tagmanĝo mi ne povis akcepti, volante viziti la esperantistaron en la urbeto *Olot*. Mia konato estas homo sincera, lerta k inteligenta. Mia rigardo turniĝas al la muro de l'kamparana kuirejo; tie pendas granda nigra tabulo kun multaj esperantaj vortoj surskribitaj. Mia amiko klarigas la kialon: En la antaŭa vespero okazis esperanta leciono, kiun li faris al siaj familianoj k al la du kamparanaj junuloj. Li estas vere persistema; tiun econ mi dezirus al ĉiuj esp-istoj!

Poste mia K-do prezentas min al la du junuloj, kiuj plugas sur kampo, k ni interparolas esperante. Kaj tiam mi daŭrigas la vojaĝon ĝis Olot (6 kilometrojn de tie) k mia nova kunulo akompanas min. Ni iras piede sur la ŝoseo. En la nomita urbo, kvankam nia lando estas respubliko, ankoraŭ estas tre multaj katolikoj, kiuj kontraŭstaras ĉian veran demokration. Tie troviĝas grava esp. grupo, sed preskaŭ ĉiuj grupanoj estas katolikoj. Esperanto por ili estas luksaĵo, nenio pli. Iuj katolikoj esp-istaj eĉ esprimis sin, ke ne decas disvastigi esp-on ĉe la laboristoj, ĉar ili tro bone eklernus batali kontraŭ la kapitalismon.

Haviginte al mi esp-istan adreson ĉe la urbodomo en Olot, mi estis afable akceptata de la koncernulo; li rimarkigis, ke esp-o en Olot estas tute morta. Ni kune „elfosis" kelkajn „esp-istojn", kiuj tute forgesis esp-on; ili diris, ke ili volas ree kunveni por progresigi la movadon, sed mia nova amiko devos bicikli al Olot por fari la kurson, ĉar la lokaj esp-istoj estas tro okupitaj en la — kafejo...

Jaume Miro (12 030), Gerono.

NI REE KLARIGAS:

1. Ricevas s e n p l i a p a g o *„Sennacieca Revuo"-n ĉiuj Gek-doj, kiuj pagis jarkomence sian kotizon laŭ la bazo de A + B-eldonoj de „S-ulo". Ĉar „Senn. Revuo" aperas simple* a n s t a t a ŭ *„eldono A" (kiu lasta* n e *aperas).*

2. Nemembroj povas ankaŭ a p a r t e *aboni „Senn. Revuo"-n.*[1] *Por tiaj abonantoj ekzistas speciala tarifo, kiu estas presita en la lasta n-ro de „La Nova Epoko" (febr.) k en la* n o v a *4-*p a ĝ a, p r e s i t a p r o s p e k t o *de SAT, kiun niaj varbantoj bonvolu aktive disvastigi ĉe varbebluloj!*

3. K-doj, kiuj a p a r t e *abonis jam al „La Nova Epoko" (laŭ la antaŭa tarifo) k kiuj nun volas anstataŭe ricevi „Senn. Revuo"-n, devas pagi la diferencon inter la nuna abonprezo por „S. R." k la antaŭa por „LNE"; ĉar „S. R." estas monata eldonaĵo (sekve pli kara), dum „LNE" estis dumonata. — Sed tiu krompago* n e *koncernas membrojn, kiuj kotizis laŭ la alineo 1 (vd. supre).*

Dir. k Adm. de SAT.

[1] Same membroj, kiuj volas havi *plurajn* ekz-ojn de „S. R.", ĉu por disdoni, ĉu por sendi al Sovetianoj, ktp.

EKS-TLES-ANOJ ANIĜU ĈE SAT!

Dum ses jaroj TLES provis stariĝi. Ĉiufoje, kiam ĝi provis levi la kapon, ĝi falis teren kun malpli da forto por denova provo. Post ĉiu malsukceso kelkaj estis perditaj por la movado ... esperanta. De pli ol unu jaro neniu numero de ĝia organo aperis, eĉ neniu vivsigno estis videbla. Tamen ne ĉiuj malkuraĝiĝis k forlasis la esp. movadon. Tial ĉe la 12-a SAT-kongreso la lastaj TLES-anoj, kies energio ne estas venkebla, kuniĝis k studis la situacion. Konklude estis decidite voki ĉiujn anarkistojn k sindikatistojn por grupiĝi frakcie en SAT. La motivo estis, ke propra organizo ne estas vivigebla k ke post foriĝo de la plej granda parto de la bolŝevikoj el SAT, ĉi tiu povus iĝi unutendenca asocio. Konservi ĝian nunan senpartiecon estas eble, se ni grupiĝas en frakcio, k tiel ni povus laŭstatute esprimi nian opinion.

Sed subite reaperas K-doj pretaj revivigi la dekfoje mortintan Asocion, el Lajpcigo, Berlino, Stokholmo, ktp. Ĉu tiuj K-doj estas tiel subjektivaj por ne rimarki, ke laŭ nombro k monhavo ne estas eble havi anarko-sindikatistan asocion? Ĉu ankaŭ ne estas evidente, ke oni povas fari pli por sia propra ideo, se oni kontaktas kun nesamideanoj? Ĉu ne estas pli efike aperigi niajn librojn k artikolojn ĉe SAT, kie ili estos legataj milope k de konvinkotoj, anstataŭ de kelkaj centoj da konvinkitoj?

Iu K-do el Berlino skribis post la Amsterdama Kongreso: „Ĉiuj liberanaj esp-istoj, sindikatistoj, anarkistoj k a. nepre devas aliĝi al TLES, se ili *ne* volas resti neŭtralaj. Neŭtralo en ĉi tiu okazo ne ekzistas, ĝi estas nur perfido al la propra ideo." Kaj poste: „nia movado devas esti — k estas — nur ero de la tutmonda prolet-batalfronto." Ni vidas en tiuj du frazoj kontraŭdirojn. Se la esp. movado estas ero de la proletbatalo, tiam ni povas esti en neŭtrala prolet-asocio por helpi al la prolet-, t. e. al la klasbatalo, k tio ne estas perfidi propran ideon. Sed, ja bedaŭrinde, estas multaj *puraj* tendenculoj, kiuj

Ĉiu grupo, ĉiu aktiva varbanto

antaŭmendas kiom eble plej da ekz-oj kun a n t a ŭ p a g o el

speciala maja numero de „Sennacieca Revuo"

eldonota okaze de la Tutmonda Festotago de l'Laboro. Kunlaborajojn por ĝi akceptas la Redakcio ĝis la 25. aprilo!

Prezoj: 1 ekz. 0.30 mk g., 5 ekz-oj 1.— mk.
10 „ 1.80 „ 20 „ 3.30 „
ĉiu plia deko 1.50 mk.

HELPU al la sukceso de tiu ilustrita varb-n-ro kun dukolora titolo!

Red. k Admin.

metas sian ideon, sian idealon, super la intereson de la klaso, k tra ĝi de la individuo. Tiuj purpuruloj preferas esti dek en senviva aŭ surpapera asocio, ol esti cent inter milmembra asocio. Nu, kiel ni agu? — Mi konkludas, ke eĉ la liberan-tendencanoj havas intereson esti en SAT; plej gravas la intereso de la proletaro k de nia persono, tial ni kunigu ĉiujn laboristajn fortojn en kiel eble plej fortika prolet-asocio. Por sukcesi en tio, necesas eviti disigajn polemikojn k, ĉiam serĉi rimedojn de proletkunlaborado por plej granda profito al nia klaso.

Ĉiuj en SAT kunlaboru! Vivu SAT por la proletaro! *A. Ozre.*

La sekretario de la anarkista frakcio estas: K-do *V. VESELS*, Vespuccistrat 97, *Amsterdam-W*, Holando. Kiuj posedas monerojn, sendu al li. Frakcianoj irontaj al Stokholmo, sciigu tion al la sekretario!

Interesa rakonteto el esperanto-lernolibro.

Amiko, ukraino, loĝanta en Kanado, deziras lerni esperanton. Li turnas sin al mi k petas, ke mi havigu al li ukrainlingvan instruilon. Estas ne facile ricevi ĝin, sed iel mi tamen sukcesis havigi al mi tian. Hejmen veninte, mi foliumas en la lernilo k ekvidas titolon de ekzercaĵo:

„Kio estas SAT k SEU?“

Pli granda fariĝas mia intereso k ju pli mi legas sur paĝo 67 de la ukrainlingva nova gramatiko de Voleviĉ (esperanta teksto), des pli granda fariĝas mia miro k nekredema amuzo pri tio, kio estas legebla por ĉiu ukraina leganto aŭ esp-isto, kies feliĉo estas hazarde preni la libron en sian manon. Legu atente k vi frotos viajn okulojn tiel, kiel ĉiu sensuspekta K-do:

„Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) fondita en 1921 jaro, celas la utiligon de la internacia lingvo esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro. Ĝi batalas por realigo de la devizo „Proletoj de la mondo, unuiĝu vin!“ SAT eldonas dusemajnan gazeton kun socipolitika enhavo, raportoj pri laborista vivo en ĉiuj landoj *„Internaciisto“* (!!!), kiu estas organo de la klasbatala esperantistaro. *„Internaciisto“* (!!!) estas dediĉata al praktika aplikado de esperanto por la celoj de klasbatalo.

Ĉiu klaskonscia laboristo, kiu deziras trovi valoran helpon en siaj tutmondaj interrilatoj k emas perfektigi siajn sciojn en la lingvo, *devas aliĝi al SAT*, kunlabori en „Internaciisto“ (!!!) k legi ĝin, varbante abonantojn por ĝi inter vastaj proletaj rondoj.“ (!!!)

La sekvanta alineo estas senmensoga, same kiel ĉio estas vera, kio rilatas al SAT, kun la escepto, ke ĝia organo estas „Sennaciulo“ k ne „Internaciisto“. Ve al tiuj infanvartistoj, kiuj trompas siajn bonanimajn, bonkredemajn lernantojn! Viaj mensogoj pruviĝos bumerangoj,[1] kiuj resaltos por frakasi vian trosagacan kranion.

Gek-doj, zorgu, ke la mensogo forvelku vid-al-vide de la vero. Dissendu la artikolon. Diskriu la veron: SAT havas nenion komunan kun „Internaciisto“, kiu malantaŭ la estimata nomo „SAT“ volas rikolti, kion SAT-anoj semis. Aliĝu al SAT k legu ties malnovan laŭ nomo k spirito organon „Sennaciulo“! *1307.*

[1] Indiana ĵetilo, kiu resaltas al la ĵetinto.

EKSTER NIA MOVADO

La *Manĉuria* Federacio de Esp-istoj unuanime decidis klopodi por proponi esp-on kiel oficialan lingvon de Manĉukuo, — por abolicii la anglan lingvon, — por enkonduki esp-on en Manĉuria fervojo k Kantunggubernio.

En *Japanio* eŭropa esp-isto, reprezentanto de religia sekto Oomoto, faris dum 6-monata propaganda vojaĝo centon da paroladoj en diversaj lokoj antaŭ pli ol 10 mil aŭskultantoj k 50 ĵurnaloj publikigis raportojn pri lia vojaĝo.

En *Ĉeĥoslovakio* estas organizitaj proks. 300 esp-istoj en la neŭtrala „Germanlingva Esp. Ligo“ k ankoraŭ malpli en „Ĉeĥoslovaka Asocio Esp-ista“, dum U.E.A havas preskaŭ 1200 membrojn en tiu lando!

Per raportoj de eldonejoj en *Svedio* estas konstatite, ke ĝis la 1. dec. 1932 estis venditaj dum tiu jaro 10 530 kurslibroj, 4 000 korespond-kursaj instruiloj, 3 000 vortaroj k 17 000 broŝuroj entenantaj esp. „ŝlosilon“ (gramatikan resumon).

Ĉinaj policoficiroj, kiuj venis el la policlernejo en Hankovo al Vieno, por studi dum 2 jaroj, eklernis en la tiea policlernejo esp-on.

La hispana ministerio por publika instruado konsentis al la Hisp. Esp-Asocio subvencion de 5000 pesetoj por ampleksigo de l'esp-instruado. 11 premiotaj geinstruistoj povos ĉeesti senpage la Univers. Kongreson en Kolonjo.

La ĉefo de japana naciista partio, urbestro de Tokio, rekomendis per radio-parolado la alprenon de esp-o kiel solan intern. lingvon.

La urbestraro de Kolonjo promesis, ke dum la ĉi-jara Universala Esp.-Kongreso en tiu urbo en unu tago la katedralo, pontoj k la maldekstra Rejnbordo estu feste iluminataj. Aliĝis al tiu Kongreso ĝis komenco de marto 354 p. el 26 landoj.

Oni petas nin kompletigi la noton aperintan en la n-ro 397 sub sama rubriko pri „Oomoto“ en *Kiev* (Sovetio) jene: „La Oomoto-ekspozicio estas *konstanta* subfako en sektana fako de la Muzeo pri historio de la religio en unu el la plej grandaj en USSR *ateismaj* institucioj (Tutukrainia Muzea Urbeto).“

RADIO-PROGRAMO:

25. 3.:
17.50—18.00: Brno, 341,7 m, parolado.
26. 3.:
9.00— 9.30: Helsingborg, parolado.
21.15—21.50: Minsk, 1105 m, parolado.
22.07—22.30: Leningrad, 857 m, informoj.
2. 4.:
10.00—10.30: Stokholm, 435 m, Motala 1348 m k relajoj, esp. kiel kulturfaktoro.

K-do 13 025 petas, ke oni alpropagandu esp-e la direktoron de l'Katovica stacio (adr.: Dir. Stéphane, Tijmieniecki, Radio-Pologne, *Kattovic* (Polio). Ĉar tiu direktoro resp. al koresp-aĵoj el tutmondo, kun celo formi tutm. interkoresp-aron.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Juna Esperantisto. Internacia monata junulara revuo. Ofic. organo de Tutmonda Esp. Junulara Asocio. Red.-Admin.: *Krakow*, Lelewela 9 m. 2, Polio. Abono: 2.50 sv. fk. — 8 pĝ. Form. 17 × 25.

Simila gazeteto, aperinta en 1931 post la Krakova neŭtrala kongreso sub titolo „Juna Samideano“, malaperis. Ĉu ĉi tiu estos pli bonŝanca? Ni atendu. La ekstera prezentmaniero de l' gazeto ne estas tre loga: malbona papero, malgrandaj neklaraj litertipoj. Enhavo: informoj el esp. junulara movado, alvokoj, pacismo, skoltismo, kelkaj bildoj el Manĉurio.

Antaŭen en la proletan amason de la Ruhrregiono. Speciala eldono de Informilo de la lab. esp. grupoj en la Boĥuma regiono (20. nov. 32). Red. K. Zernikov, Spichernstr., *Bochum*.

La enhavo de tiu ĉi festnumero de polikopiita informilo (parte esp-lingva, parte germana) estas verkita de fervoraj SAT-anoj okaze de renkontiĝo, jam priparolita en la n-o 399, p. 44, iom detale. Ni notas rimarkindan salutpoemon de K-do Burger, sencoplenajn artikolojn de K-doj Zernikov, v. d. Heid, Jirŝik, Salmen k leteron de K-do el Le Havre.

NIA POŜTO

8358. — 5 akcioj ricevitaj.

Al multaj. — Neniam forgesu citi vian membromatrikulon. *Adm.*

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo“:

Bulletin Corporatif (instruista), Lyon, jan.; *The Los Angeles Citizen*, 25. 11., esp. en lernejoj (396); *The Industrial Worker*, Chic., 13. 12., striko en Nederl. (396), 20. 12., germ. mizero (397); *De Fakkel*, Amstd., 4. 2., Proletoj ĉiul. unuiĝu (400). *Aufstieg*, Stuttgart, marto (let. el Norda Afriko).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Le Libertaire, Paris, 6. 1.; *Le Populaire*, Paris, 23., 24. 1.; *Le Travailleur de Belfort*, 21. 1. (angulo) 11. 2.; *L'Effort*, Lyon, 31. 12.; *L' Ami de la Nature*, Strasbg., jan/feb., (pĝ. en esp-o); *Signalen*, Stokh., 5., 19., 26. 1., 9. 2., 16. 2., 23. 2., 2. 3.; *Arbetaren*, Stokh., 10. 1.; *Der Funke*, Berl., 13. 1.; *De Fakkel*, Amsterd. (rubr.), 26. 1., 7. 2.; *Nervio*, Buenos-Aires, dec.; *D. Volkslehrer*, Harburg, 10. 1., 20. 2.; *Volksblatt*, Bochum, 21. 11.; *Manchester Guardian*, 28. 1.

Pri la SAT-Kongreso:

Signalen, Stokh., 2. 2.

Represis el „Ni Legu“:

Das Andere Deutschld., 10. 2., karnavalo.

Raportis pri la SAT-Kongreso:

Arbetaren, Stokh., 23. 2., M.

Aperigis priesp. anoncojn:

Les Tablettes de l'Aisne, Laon, *L'Avenir de l'Yonne*, Sens, *L'Effort*, Lyon, *L'Ecole Libératrice*, Paris.

KORESPONDADO

BELGIO

K-do *C. Severius*, Touwstraat 22, I, *Antwerpen*, dez. interŝ. PM kĉl.

NEDERLANDO

Anoj de Lab. Esp. Grupo „Ni venkas“ koresp. kĉl. Gek-doj. Skribu al: K-do J. Sterken, Vorstenstr. 60, *Heerlen*.

SVEDIO

K-do Folke Malmgren, Sjöstrand 3, *Karlstad*, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI.

15 gelernantoj koresp. kĉl, PI, ktp. Skribu al: K-do Yngve Sandström, L. B. 220,b. *Hagfors*.

100 gekursanoj

dez. koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Respondo estas garantiata. Skribu al: „Esperanto Klubo Uragano“ Valfried Göransen, Götagatan 14, *Varberg* (Svedio).

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)